

Svisa Ski-lernejo

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 743, 1978.01.04 & 06 & 07

Cl.- Parolas Claude Gacond. Dum vi aŭdas tiun ĉi novjaran elsendon, en Adelboden konkludiĝas la 21-a skiferio por esperantistoj. Tiun ĉi 10-tagan restadon partoprenis skiemuloj el Finnlando, Francio, Germanio, Italio kaj Svislando. Dank'al la instruado de diplomita ski-profesorino, ĉiuj lertiĝis en la arto alvaladi sur neĝaj deklivoj.

Por tiuj, kiuj ne partoprenas restadon, kie deĵoras ski-instruisto, tamen ekzistas ebleco frekventi bonajn ski-kursojn. Ilin gvidas la famiĝinta Svisa ski-lernejo. Hodiaŭ, laŭ informoj, kiujn ni trovis en la decembra numero de la revuo Schweiz - Suisse - Svizzera - Switzerland eldonata de Svisa turismoficejo, ni raportos al vi pri la aktiveco de la organizo Svisa ski-lernejo.

Kiam oni parolas pri Svisa ski-lernejo, oni precipe aludas la turisman institucion, kiun oni rimarkas en ĉiuj vintraj sportferiejoj kaj kiu estas nepre utila al ski-komencantoj. Sed ankaŭ funkcias Svisa ski-lernejo en la plimulto de la urboj; tie ĝi organizas ski-instruadon kaj ekskursojn. La ĝenerala nomo Svisa ski-lernejo aplikiĝas al la 185 instruejoj aniĝintaj al Asocio de svisaj ski-lernejoj, same kiel al la aro de instrumentoj pri skiado en nia lando.

Tiu nomo 'Svisa ski-lernejo' rilatas do al la teorio kaj al la praktiko de la tutnacia ski-instruado. Konjekteblas, ke en Svislando ĉirkaŭ 60 procentoj de la ski-instruado okazas en la kadro de la oficialaj ski-lernejoj svisaj. Sume en la jaro disvolviĝas proksimume 10 milionoj da skilecionoj. La 40 procentoj, kiuj ne dependas de oficialaj ski-lernejoj svisaj, distribuiĝas inter la registara organizo Junularo kaj sporto, la privataj ski-lernejoj, la publikaj lernejoj kaj aro da societoj kaj asocioj. Ĉiuj organizoj, kiuj zorgas pri ski-instruado aliĝis al la vasta organizo Svisa inter-asocio por skiado. El tio vi facile komprenos, ke la skiado estas instruata laŭ unuigitaj metodoj.

Ekde 1933 oni sume registris en la instruado de Svisa ski-lernejo 91 milionojn da lecionoj. Supozeble lernanto frekventis la lernejon dum proksimume unu monato. El tio dedukteblas, ke proksimume unu miliono da skiantoj iam lernis la praktikon de la skiado en la kadro de Svisa ski-lernejo.

La ski-klasoj antaŭe konsistis en sia plimulto el plenkreskuloj. Kontraŭe nuntempe la proporcio modifiĝis favore al la infanoj. Oni kalkulas, ke en tuta Svislando 60 procentoj de la lernantoj en ski-lernejoj estas infanoj malpli aĝaj ol dekdu jaroj. Inter la plenkreskuloj plimultas la fremduloj, ĉar plejparte la svisoj jam intimiĝis kun la skiarto dum la infaneco.

La simpligitaj labor-metodoj de Svisa ski-lernejo permesas al la lernantoj ne antaŭ-anonci sin aŭ rezervi lokon. Kiel por kliento de fervojo, sufiĉas havigi al si aŭ al siaj infanoj abonamenton por 1, 3, 6 aŭ 12 duon-tagoj, laŭ la propra elekto, aŭ semajnan lern-karton. Poste oni iras je la indikita horo al la rendevuejo de la lernejo. La necesajn sciigojn oni ricevas ĉe la loka ski-lernejo, aŭ se ĝi ne ekzistas, tutsimple ĉe la turism-oficejo.

Kelkaj ski-lernejoj vartas pri la infanoj dum la gepatroj libere ĝuas pri la ski-ĝojoj, tio de la 10-a matene ĝis la 16-a horo. Ĉiuj ski-lernejoj instruas la skiadon al la infanoj, ekde kiam ili fariĝas relative sendependaj, tio estas ekde la 4-a aŭ 6-a jaro. La instruado okazas ĝenerale matene de la 10-a horo ĝis la 12-a kaj posttagmeze de la 14-a ĝis la 16-a, sed ankaŭ ofte ĝi disvolviĝas de la 10-a ĝis la 16-a. La instruado tiam inkluzivas tag-manĝon.

Oni pli kaj pli konsilas al la plenkreskuloj, kiuj estas ski-komencantoj, ekpraktiki unue la promen-skiadon. Krom la sanigaj efikoj la komencantoj tiel akiras sendanĝere bazteknikon, kiu poste utilos en la lernado de la alvala skiado. La angla proverbo 'time is money' ne valoras por la skianto. La tempo dediĉita al la ellerno de la skiado kontiĝas profite al sekureco.

La ski-tekniko kaj instru-metodoj pli kaj pli baziĝas sur elprovitaj principoj. Ili celas sekurecon, fiziologian raciecon, agrablan vivon kaj malkarecon, kvankam la skiado estas en si mem sufiĉe kosta sporto.

Kiam ni rigardas malantaŭen, al la unuaj skiferioj, kiujn ni organizis en Adelboden, ni ekkonscias, kiom progresis tiu ĉi sporto kaj kiom ĝi demokratiĝis. Kelkaj bedaŭras la belajn jarojn, kiam skianto estis privilegiitoj. Nun kontraŭe svarmas la homoj sur la skieblaj montoj dum la vintraj monatoj. Industrio naskiĝis. Sed kun ĝi ankaŭ sanon kaj ĝojon gajnas milionoj da homoj por la tuta jaro. Tion ĉi ni spertas ĉiujn vintrojn.

Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude Gacond. Ĝis reaŭdo !

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2012*